Flandra Esperantisto

VLAAMSE ESPERANTISTENBOND
St. Klaradreef 59, BRUGGE

Tweemaandelijks Tijdschrift
26e Jaargang

juli - augustus 1959
Nummer 4 (287)

VAN A TOT Z

VAN ANGLIA TOT ZODIAC

ANGLIA DELUXE — Tweedeur
PREFECT DELUXE — Vierdeur
4 cyl. - 36 rem-pk - Taks: 6 pk
Verwarmings- en ontdooiïngsapparaat standaarduitrusting
Betalingsmogelijkheden : tot 36 maanden

BEANTWOORDT FORD AAN UW WENSEN

CONSUL
4 cyl. - 59 rem-pk - Taks: 10 pk
In zijn klasse de enige wagen die plaats biedt aan 6 personen.

ZEPHYR
6 cyl. - 86 rem-pk - Taks: 13 pk
De ideale wagen voor beroepsbezigheden en het week-end.

ZODIAC
6 cyl. - 86 rem-pk - Taks: 13 pk
Zeer luxueuze uitvoering van de Zephyr.

Vraag zonder enige verplichting de brochure over de ganse reeks aan de officiële Ford-verdeler

FORD SERVICE

FORD

FORD MOTOR COMPANY (BELGIUM) N.V.

Rechtstreekse verdeler van Brugge en omstreken

GARAGE CANADA

GULDEN VLIESLAAN 68 BRUGGE — TEL. 34611

Flandra Esperantisto

Eldono de FLANDRA LIGO ESPERANTISTA

REDAKCIO : Drs. F. Roose, Sinte Klaradreef, 59, Brugge - Belgujo
Tel. 319.81.

VLAAMSE ESPERANTISTENBOND

aangesloten bij **Universala Esperanto-Asocio**

VOORZITTER : G. Debrouwere, Magdalenastraat, 29, Kortrijk.

SECRETARIS : G. Maertens, Prins Leopoldstraat, 51, Sint-Kruis
Tel. 349.35.

PENNINGMEESTER : Mej. J. Terryn, Raapstraat, 74, Gent.

UEA-VERTEGENWOORDIGER :
Dr. F. Couwenberg, Koninginnelaan, 14, Blankenberge
P.C. 4161.35.

CORRESPONDENTIE-KURSUS :
A. Van De Velde, H. Pirennelaan, 25, Gentbrugge.

FLANDRA ESPERANTO INSTITUTO :
Blankenbergse steenweg, 72, Brugge. P.C. 3268.51.

Lidmaatschap :

Leden : **100 F** (met inbegrip van het tijdschrift)
Steunleden : **150 F** (idem)
Inwonende leden : **25 F** (met inbegrip van " De Esperantist ")
Jongeren : **50 F** (onder de 21 jaar)
Abonnement : **75 F**

Postcheckrekening 2321.50

van de Vlaamse Esperantistenbond te Gent.

Tarief van de aankondigingen :

(geldt alleen voor firma's, niet voor correspondentie-adressen)
1 bladzijde : **500 F** (afmeting 20 × 12)
1/2 bladzijde : **300 F** (afmeting 10 × 12)
1/4 bladzijde : **150 F** (afmeting 5 × 12)

Daar het bedrag verschuldigd voor de aankondigingen die meerdere malen moeten verschijnen, gefaktureerd wordt na het verschijnen der 1ste aankondiging, wordt op de voormelde tarieven de volgende vermindering toegestaan :
20 % voor een aankondiging die 3 maal wordt opgenomen,
30 % voor een aankondiging die 6 maal wordt opgenomen.

Verdere inlichtingen nopens de aankondigingen in het sekretariaat.

Dr. L. L. Zamenhof

(1859 - 1959)

door Prof. Dr. Edmond Privat, Ere-President van Radio-Genève

Een honderdtal steden in Europa en in Zuid-Amerika heeft reeds aan een van hun straten de naam gegeven van Dr. L. L. Zamenhof, die in 1887 in Warschau zijn eerste leerboek van de Internationale Taal uitgaf onder het pseudoniem " Doktoro Esperanto " — de man die hoopt. Inderdaad hoopte hij, dat dit woordenlijstje van de stamwoorden, die gemeenschappelijk zijn aan de voornaamste indo-europese talen als basis zou kunnen dienen voor een neutraal verkeersmiddel tussen de verschillende volkeren en dat het gebruik daaraan de groei, de verrijking en het vloeiende van een levende taal zou geven.

Om dit mogelijk te maken stelde hij enkele eenvoudige regels voor de spraakkunst vast en een lijst van voor- en achtervoegsels voor normale afleidingen. Voor het overige stelde hij vertrouwen in het leven en in de natuur, liever dan een geheel gereed kunstmatig product voor te stellen. Juist in die wijsheid was zijn wetenschappelijke helderziendheid gelegen. Inderdaad heeft deze klankrijke taal, die men nu in de uitzendingen van tal van radiostations in verschillende landen en in steeds meer internationale congressen onder de naam Esperanto kan horen, zichzelf door het gebruik opgebouwd op de grondslagen gegeven door Zamenhof, die zoals hij zelf zeide de initiatiefnemer en niet de schepper wilde zijn.

Een profetische beweegreden

De groei van de taal en van de literatuur in Esperanto werd krachtig ondersteund door de idealistische beweegredenen, die Zamenhof en zijn vrienden inspireerden. Zamenhof werd in 1859 in Bialystok in Lithauen geboren, in dat oostelijk deel van de oude Poolse republiek, dat door het Russiche rijk was geannexeerd en waar de tsaren honderdduizenden Joden heenzonden. De vader van Zamenhof was zelf een Jood en leraar in vreemde talen. De zoon Ludwik leed als kind onder de vijandige verhoudingen, die er onder de bewoners van Bialysok met hun verschillende talen bestonden. De overheidspersonen waren daar Grieks-Orthodox en zij spraken Russisch. De meer gegoeden waren grotendeels Katholieken, die Pools spraken, terwijl het volk ten dele uit Lithauers of Wit-Roethenen bestond. De handelaren waren voor het merendeel Joden, die Jiddisch spraken en in een afzonderlijke wijk woonden. De talen, de gewoonten, de godsdiensten waren verschillend en door vooroordelen waren de mensen verdeeld. De knaap had de indruk, dat onwetendheid en misverstand oorzaak waren van vele van de ruwste gevechten. Hij meende, dat een gemeenschappelijke taal reeds een gedeele van de scheidsmuren zou wegnemen en althans onderling begrijpen tussen verschillende volkeren zou mogelijk maken.

Dit denkbeeld ging met hem mee naar Warschau, waarheen de familie verhuisde en waar hij het gymnasium ging bezoeken. Het bleef hem bij gedurende zijn gehele loopbaan, te zamen met de wil om zijn leven te wijden aan het stichten van vrede tussen de naties. Hij was diep doordrongen van de fundamentele eenheid van de mensheid niettegenstaande de verschillende verdeeldheden en hij legde de nadruk op dat bewustzijn in zijn latere dichterlijke werken, want hij had een poëtische en vooruitziende geest.

Zamenhof voorzag, dat er een tijd zou komen, waarin de mensheid zijn ziel zou zoeken en een orgaan zou nodig hebben om dat tot uitdrukking te brengen. Die overtuiging spoorde hem aan, niet alleen tot een taalkundig, maar ook tot een literair initiatief en dat heeft zonder twijfel vleugels gegeven aan de Esperanto-beweging met zijn congressen, zijn tijdschriften en zijn boeken.

Dat bevestigde de Volkenbond in zijn rapport, aangenomen in zijn algemene vergadering in 1922 en UNESCO in zijn resolutie van 1954, toen deze verklaarde, dat de resultaten door Esperanto bereikt in overeenstemming zijn met de doeleinden van UNESCO zelf om het bewustzijn van de gehele mensheid te doen ontwaken. Dat was juist wat Zamenhof wilde.

De loopbaan

Geen enkele taal kan leven zonder ziel. Iedere nationale taal brengt de ziel van een volk of van een beschaving tot uiting. Esperanto drukt het verlangen uit van de mensheid naar eenheid en die inspiratie verklaart het geheim van zijn opleving. Zelfs alleen reeds uit zuiver taalkundig oogpunt wekt het verschijnsel belangstelling. Zamenhof zelf vertelt, dat hij en zijn kameraden van het gymnasium in de nieuwe taal zongen over het wegvallen van de vijandige scheidsmuren tussen de naties. Dit gebeurde in 1878 toen zij de internationale woordenlijst hadden geleerd, die hij reeds als jongen had samengesteld. Maar zijn realistische vader nam de schriften in beslag, waarin de jongeman zijn woordenlijst had geschreven en zijn spraakkunst en zijn gedichten en gebood zijn zoon die dromen te laten varen en zich voor zijn loopbaan voor te bereiden. Hij liep dus het gymnasium af, studeerde in Moskou medicijnen en werd dokter. Later studeerde hij nog in Wenen en specialiseerde zich in Warschau als oogarts.

Maar toch verliet zijn droombeeld hem nooit en aan zijn levensdoel bleef hij onwankelbaar trouw.

In 1887 trouwde hij en zijn schoonvader Silbernik steunde hem financieel bij de uitgave van het Eerste Leerboek en de internationale woordenlijst van Doktoro Esperanto. Het duurde lang eer hij bijval kreeg, totdat Leo Tolstoj, de grote Russische schrijver, het boekje las en in de revue van de uitgeverij Posrednik in 1894 openlijk alle Christenen aanbeval de taal te leren, want " de moeite is zo gering en de mogelijke gevolgen voor de mensheid zijn zo groot, dat niemand moet nalaten de proef te nemen".

In de laatste jaren van de eeuw interesseerden beroemde Franse geleerden zich voor de zaak en in de Academie voor Morele en Politieke Wetenschappen diende George Picot een rapport in van de Geneefse filosoof Ernest Naville, die de invoering van het Esperanto in alle scholen van de gehele wereld aanbeval.

Er verschenen tijdschriften in de taal in verschillende landen, er werden verenigingen gesticht en in 1905 kwam in Boulogne-sur-Mer het eerste Esperanto-wereldcongres bijeen, waaraan Zamenhof zelf deelnam, tegelijk met generaal Sébert van de Franse Académie des Sciences, met de psycholoog Boirac, rector van de Universiteit in Dijon en met 800 baanbrekers uit 30 landen.

Dit was de eerste internationale ontmoeting op ruime schaal, waarbij slechts Esperanto werd gebruikt. Het was ook de eerste gelegenheid voor veel van de congressisten om de taal te horen en te spreken. Men vroeg zich af of het experiment zou slagen en de journalisten waren verwonderd over het volledige begrijpen en het gemak van de besprekingen. Wanneer men de tegenwoordige congressen met het eerste vergelijkt, dan valt natuurlijk een grotere eenheid in de uitspraak op, een meer vloeiend spreken en een veelvuldiger welsprekendheid, maar reeds toen klonk de taal als een levende taal, vooral uit de mond van de Slaven.

Het meest verwonderd was Dr. Zamenhof zelf, die de Franse regering toen tot Ridder van het Legioen van Eer maakte. Uit de mond van de congressisten klonk nu de nieuwe taal, die gegroeid was uit dat eerste begin, dat hij in zijn jeugd met zijn mede-gymnasiasten beproefd had. Maar wat hem zelfs nog meer verwonderde, dat was de algemene geest van broederschap tussen de afgevaardigden van verschillende nationaliteit en hun bevrijding van alle complexen van minderwaardigheid of superioriteit van de moedertalen. Dat bracht hij tot uitdrukking in een gedenkwaardige rede, waarin hij zijn vreugde over die gelijkheid uitsprak. Van hun kant waren de congressisten onder de indruk van zijn in het oog vallende bescheidenheid en zelfs enige bedeesdheid tegenover het publiek. Hij gedroeg zich altijd zeer nederig en liet gaarne de voornaamste plaats aan anderen over.

Denkbeelden over de ethica

Het tweede Esperanto-wereldcongres had in 1906 te Genève plaats en daar gaf Dr. Zamenhof uiting aan zijn smart over het progrom, dat zo juist de straten van zijn geboortestad Bialystok met bloed had bevlekt. Het derde kwam in 1907 in Cambridge bijeen en vlak daarna ontving de burgemeester van Londen, Sir Vezey Strong, Zamenhof plechtig in de Guildhall in een grote openbare bijeenkomst, waar deze laatste antwoordde in een opmerkenswaardige rede over het verschil tussen vaderlandsliefde en chauvinisme. En elk jaar kwamen zulke congressen bijeen en Zamenhof sprak altijd in een gedenkwaardige openingsrede zijn denkbeelden uit over verdraagzaamheid en menselijke rechten.

Na 1912 hield hij met die gewoonte op en besloot hij afstand te doen van de ereplaats in de congressen en zijn volledige persoonlijke vrijheid te hernemen. Hem hielden de ethische problemen van de mensheid bezig en hij wilde de uitsluitend taalkundige zijde in de handen laten van de inmiddels opgerichte organisaties, o.a. van de Academie van schrijvers en taalkundigen.

Tot het rassen-wereldcongres in Londen in 1912 richtte hij een rapport, waarin hij de geleerden ondersteunde, die van oordeel waren, dat de traditionele en morele verschillen van meer betekenis waren dan de fysische. Hij was van mening, dat de volkeren voornamelijk verdeeld zijn door hun talen en hun godsdienstige gewoonten. Daarom beval hij het onderwijs aan van een neutrale taal en het aannemen van een neutrale, algemeen menselijke ethiek.

De eerste wereldoorlog van 1914 was een wrede slag voor die grote vriend van het mensdom. Russische en later Duitse legers bezetten Warschau, terwijl hij reeds aan een ernstige hartziekte leed. In 1916 schreef hij zijn " Brief aan de Diplomaten ", waarin hij aanbeval, dat men niet alleen denke aan de veranderingen van de landsgrenzen, maar dat men waarborgen geve aan de minderheden voor hun taal- en godsdienstige rechten. Hij gaf ook de raad om neutrale namen te geven, bij voorkeur aardrijkskundige, aan provincies of staten met bewoners met verschillende talen, om te voorkomen, dat gedeelten van de bevolking zich vreemd zouden gevoelen in hun eigen land als dit genoemd werd met de naam van een overheersend ras. Hij juichte namen toe als Verenigde Staten of Zwitserland, die niet de naam bevatten van een stam boven de andere.

Dr. Zamenhof stierf in april 1917. Zijn Internationale Taal verloor tweemaal door een wereldoorlog een groot gedeelte van zijn aanhangers en van zijn bibliotheken, maar tweemaal herleefde hij en breidde zich uit. Nu wordt de taal niet alleen door Esperanto-congressen gebruikt, maar ook door andere technische en speciale wereldconferenties, zoals door bijeenkomsten van onderwijzers, Katholieken, Protestanten, van arbeiders, voor tourisme e.d. Overal waar het Esperanto doordringt, brengt het ook wat van de algemeen menselijke geest mee, waardoor Zamenhof geïnspireerd werd. Van een zuiver taalkundig oogpunt bezien, ontwikkelt het zich en groeit het op de natuurlijke wijze, die hij voorzag.

De gedrukte werken van Zamenhof omvatten niet alleen zijn gedichten, redevoeringen en artikelen, maar ook vertalingen van Gogol, van Shakespeare, van Dickens, van Goethe, van Molière, van Andersen en van het gehele Oude Testament, dat door de British Bible Society in het Esperanto werd uitgegeven, te zamen met het Nieuwe Testament. Hij was een talentvol schrijver met een sterk gevoel voor het muzikale ritme van de stijl.

ZONDER UW BIJDRAGE KAN DE VLAAMSE ESPERANTISTENBOND NIET BESTAAN !!!!

Slechts éénmaal per jaar doen wij beroep op onze leden om een geringe bijdrage van 100 F te storten. In feite is deze som te gering geworden, maar het bestuur laat aan de leden de mogelijkheid zelf te bepalen of zij een hogere som wensen te storten als steun nl. 150 F. Tot nu toe zijn er steeds een vijftiental leden geweest die deze som betaalden. **Wij rekenen er op** dat meer dan de helft van onze leden minstens voor het jaar 1959 tot de storting van dit bedrag zullen overgaan.

De volgende leden hebben aan onze oproep gevolg gegeven :

1 Mevr. A. Meurrens Leuven
2 Hr A. Marmenout Blankenb.
3 Hr E. De Baets Berchem
4 Mevr. J. Terrijn Gent
5 Hr L. Paeleman Herseaux
6 Hr H. Van Roye Heule
7 Hr V. Jurgens-Hoogboom Kapellen
8 Hr Meeus Antwerpen
9 Hr A. Pittoors Antwerpen
10 Hr F. Couwenberg Blankenb
11 Hr G. Maertens Sint-Kruis

12 Mej. M.J. Top, Veurne
13 Hr. G. Debrouwere 500 F Kortrijk
14 Hr. J. Derks, 175 F Monte-Carlo
15 Mej. P. De Cock, Aalst
16 Mej. B. Cornelis, Aalst
17 Hr. H. Vermuyten, Antwerp.
18 Hr. P. Samyn, Roeselare
19 Hr. A. Van de Velde, Gent
20 Hr. E. Symoens, Leopoldstad
21 Hr. G. Deboes, Gent
22 Hr. F. Roose, Brugge
23 Hr. C Hinderyckx, Brugge
24 Mej. A. Van Wezel, Brugge
25 Hr. A. Dumarey, Brugge
26 Hr. A. Claeys, Brugge
27 Hr. R. Iserentant, Brugge
28 Mej. S. De Koninck, Brugge
29 Mej. T. Devreese Brugge
30 Hr. L. Danneels Brugge
31 Hr. R. Martens Brugge

32 Hr. H. De Baene Sint-Kruis
33 Mej. M.L. Roose Brugge
34 Mej. S. Deschrijver Brugge
35 Hr H. Audenaert, Lokeren
36 Hr M. Demol, St-Andries
37 Mej. Van Mullem Blankenb.
38 Mej. A. Begodt Gent
39 Mevr. Marechal-Roose Assebroek
40 F. Volders Antwerpen

Zamenhof-Fondaĵo : Flandrema Grupo, Antwerpen : 50 F

Het Sekretariaat meldt ...

Wij verwachten spoedig de bijdragen van onze leden voor hun deelname aan hetU.K. op P.C. 3309.23 van Mej. J. Terryn, Raapstraat, 74 Gent. Let wel op de benaming en het nummer van de rekening ; dus **niet** op de postcheckrekening van de Bond !

Bedrag der bijdrage tot 31-12-59 : lid UEA : 400 F
niet-lid : 450 F

De echtgenote van een lid UEA betaald 200 F en van een niet-lid 225 F ; kinders tot maximum 20 jaar, 150 F.

Circulaire nr. 2 van april 1959

Aan drie oproepen tot onze leden, gepubliceerd in de voormelde rondzendbrief, werd tot nu toe nog geen voldoende gevolg gegeven :

1. Steunend lidmaatschap voor 1959 ;
2. Aankondigingen voor ons blad, of bij gebrek hieraan, een nieuw lid ;
3. Zendingen van postzegels aan P. ZACHO, Randbolvey, 4 Kopenhagen, Denemarken, namens Flandra Ligo.

Dit ter herinnering !

Kursussen 1959 - 1960

Het spreekt van zelf dat de kursussen dit jaar onder het teken van het universeel kongres te Brussel zullen moeten geplaatst worden; wacht niet te lang met de publicatie in de plaatselijke weekbladen of in de dagbladen. Een kursus moet minstens tweemaal aangekondigd worden, en kan dan nog eventueel voorafgegaan worden door een algemene tekst nopens Esperanto, zuiver informatief bedoeld. Hierbij mag niet meer gesteund worden op wat de internationale taal is, maar wel op een of andere verwezentlijking. Iedereen weet nu zo wat iets af van Esperanto, en iemand die nog niet op de hoogte is, kan gemakkelijk inlichtingen verkrijgen in zijn omgeving ; de esperantisten moeten echter het bestaan en het gebruik van Esperanto als een feitelijkheid gaan beschouwen zodat aan een buitenstaander nog alleen de nadruk dient gelegd op een positief en opvallend resultaat.

En vergeet niet het secretariaat in te lichten !

Grupa Vivado

Nederlandstalige verslagen of programma-aankondigingen in bondige stijl worden van alle afdelingen verwacht voor het novembernummer 1959 tegen 20-10-59.

Aperis la "Esperanta Antologio" Poemoj 1887-1957 kolektitaj de William AULD. Eldonis " Stafeto " sub direktado de Juan Regulo-Perez, La Laguna, Kanariaj Insuloj. 648 paĝoj. Prezo : broŝ. 3.60 ; tolbindita : 20 Us. Dol.

Mi kredas ke tiu-ĉi libro malkovros antaŭ la plej granda parto de niaj liganoj kaj legantoj tute ne konatan trezoregon. Ĝi donas de 90 verkintoj 357 poemojn. Se mi nun diras ke ĉiuj donis la pruvon esti veraj poetoj ; kaj se mi aldonas ke aliaj ankaŭ veraj poetoj ne havas lokon en tiu-ĉi antologio, mi pensas ke multaj gesamideanoj miregos ; miregos ĉar ili ne sciis ke nia sole poezia literaturo estas jam tiel riĉa. De la Flandraj poetoj estas nur unu reprezentanto : Jan Van Schoor. Multaj inter ni bedaŭros ke Juul Karnas ne estas menciita. La Nederlandanoj same povas bedaŭri ke Catharina Roskes-Dirksen ne troviĝas tie-ĉi ; du sentoplenaj poeziartistoj. Ŝajnas-kaj mi ne havas motivon por ne kredi tion-ke W. Auld laboris dek jarojn al tiu antologio, kolektante la poemojn. Ni cetere facile povas imagi ke estis giganta laboro kiu necesigis multegan kuraĝon por pacience serĉi kaj serĉi kaj serĉi ĝis kiam li fine trovis la Dio scias kie kaŝitajn poemojn. Tiu-ĉi antologio efektive ne estas nura hazarda kolekto ; sed ĝi estas historia kolekto. Cetere 12 paĝa historia skizo antaŭas ĝin. Ĝi komencas per Zamenhof kaj la unuaj pioniroj. Kiom da perloj de ili ne jam estis longtempe forgesitaj kaj metitaj en profundaj polvokovritaj ŝrankoj ? Tiurilate mi tamen miras pri io. Kial, je la komenco de la entrepreno, kaj poste de tempo al tempo, W.A. ne sciigis la legantan publikon pri sia celo ? Laŭ mia scio, tio ne okazis. En tiu kazo li estus certe ricevinta multegajn sendaĵojn. W. A. dividas la poemaron en tri partoj : primitiva romantismo, polurita romantismo kaj metafiziko.

Ĝenerale la kritiko malpravigas tiun dividon kaj ankaŭ mi ne komprenas ĝin ; eĉ opinias ĝin ne ĝusta. Kio estas polurita romantismo ? Pli pura, aŭ pli rafinita formo (laŭ la "Plena Vortaro") ? Aŭ pli da disciplino, pli da sinrego en la esprimo de sentoj kaj pensoj ? Mi ne pensas ke Zamenhof, Grabowski kaj aliaj meritas la insulton ke ili malpli rafinite aŭ malpli " fajne " (laŭ la " suplemento " de la Plena Vortaro) faris. Ili faris laŭ sia gusto, laŭ siaj ideoj kaj sentoj kiuj estis la konceptoj de tiu tuta epoko. Kondamni tion egalus al kondamno de la tiutempuloj. Tio estus subjektiva kaj danĝera. Kiam W. A. diras rilate al Esperanto ke ĝi estis " la epoko dum kiu la poetoj komencis orientiĝi en la ne-elprovita lingvo kaj trovi la plej taŭgajn esprimrimedojn kaj la plej utilajn teĥnikaĵojn . . . " (p. 16) li ne forgesu ke multaj legantoj al tio respondos : " almenaŭ ni kapablas kompreni tiujn poetojn, dum ke la nuntempajn poetojn...". La tria parto komenciĝas post la milito. Sed ekz. R. Schwartz restis la sama antaŭ kaj post la milito. Kaj ĉu ne estas metafiziko en la " Preĝo sub la Verda Standardo " ? Mi persone preferus kronologian ordon de la poetoj kaj aldonon ĉiufoje de fonto de inspiro ekz. amo, religio, infano, idealo ktp. Mi scias ke la homo de la fino de la antaŭa jarcento estis tute alia ol la nuntempa homo. Mi scias ankaŭ ke la literatura formo evoluis. Sed el la naturo de nia lingvo, tio okazis malpli en Esperanto ol en nacia lingvo : nur malplia uzo de kelkaj afiksoj kaj plia (multe plia) uzo de neologiismoj ! Nia antologio donas glosaron de kvin kaj duona paĝoj ! Rilate al la neologismoj — pri kio ni legas pli kaj pli da kondamnaj artikoloj en la naciaj Esperanto-revuoj ; leviĝis eĉ la aŭtoritata voĉo de Julio Baghy en " Pola Esperantisto " — mi tuj diru ke ankaŭ mi kontraŭstaras la ne absolute necesajn neologismojn. Sed aliflanke mi devas diri ke pere de ili ekestis kelkaj belegaj poemoj.

Tiu antologio havas, i.a. multajn meritojn, ankaŭ tiun ke ĝi vekigos en la leganto la deziron por plu legi la verko(j)n de kelkaj aŭtoroj. Ni prenu ekz. Marjorie Boulton. Post legado de la ĉi-tieaj poemoj oni nepre volas legi ĉiun poemon kiu aperas de ŝi. Ŝi tiel frapas ; la profundaj kaj ofte inter si kontraŭaj sentoj en la homo estas tiel bone diritaj ; la enbildigo estas ofte tiel imagoriĉa kaj tiel krea ; oni preskaŭ ĉiam havas la senton ke ŝi DEVAS diri ion, ke ŝi havas iun mesaĝon; tiel ke oni volas pli koni tiun personecon kaj ke oni volas sekvi ŝian evoluon. Kaj kiam poste oni legis ekz. " Kontralte " oni konscias stari antaŭ vere granda poetino. Tiu deziro por plu legi de iu aŭtoro vekiĝos kompreneble ĉe pli multaj okaze de la poemoj de R. Schwartz. Liaj tie-ĉi publikigitaj poemoj estas tiaj ke oni ĉiam plu kaj plu volas ĝui tiun vortartiston. (Liaj poemkolektoj preskaŭ elĉerpiĝis. Rapidu, leganto ! Nia instituto havas ankoraŭ kelkajn.) Mi ĝojas ĉar ne troviĝas tie-ĉi unu de liaj tro spicitaj kreaĵoj. Estas ja bedaŭrinde ke sur preskaŭ ĉiuj liaj volumoj troviĝas tia makulo : io kio pasas la limojn de la deco. Lia, laŭ mia opinio, plej burleska poemo, " Senhareco " ne estas en la antologio.

Mi forte bedaŭras ke de Brendon Clark estas nur unu-ankaŭ se longa-poemo. Lia tro mallonga vivo, en kiu la cirkonstancoj longtempe malhelpis Esperanto-laboron, kaŭzis neripareblan perdon por nia poezio. Sed la malmulto kion li postlasis apartenas al la plejbono. Rimarku ankaŭ ke liaj

poemoj estas preskaŭ ĉiuj sen elizioj. Kaj tiaj poemoj staras teĥnike super la poemoj kun elizioj. Oni pli facile legas kaj komprenas kaj elparolas ilin. Kial ekz. Cl. Piron en la cetere tre bela poemo " La soldato kiu marŝas " ne aldonis la o-finaĵon al serĝento, tento, bordo, sorto, pelo, celo, escepto, akcepto ? Mi ne vidas regulon tie-ĉi. Kaj ankaŭ se iu regulo postulus — certe devas ekzisti reguloj — oni pripensu ke la regulo devas servi la poezion ! Ne inverse ! Mi ne volas lasi la okazon represigi mallongan poemon de Brendon Clark kiun ĵus publikigis ankaŭ la " Norda Prismo", por doni ideon pri la aŭtoro.

SIMPATIO

Kiel homo, kiu en tro varma tego
kaŝe dormas apud la trankvila lago;
tiel, lacigite de la vivturmento
danke apud vi mi sidas en silento.
Vortoj, nura narkotilo por la menso
pli konfuzas al la konfuzita penso.
Al animo lumo de l' animo venas:
kion mi ne diras, tion vi komprenas.

Estas nemalhelpeble ke kelkaj legantoj malŝatos kelkajn poemoin. Mi pensas ekz. pri "Ebrio" de W. Auld sur paĝo 414. Eble mi povas katalogi ĝin en la eksperimenta poezio. Tamen ĝi estas poezio. Per kripligo de vortoj ĝi tre bone sugestas la staton de ebrio. Estas tute nature ke mi memoras nun rakonton de M. Boulton " Ebrivirgeco " kiun publikigis " La Nica Literatura Revuo ". Kiu de ambaŭ inspiris la alian ? Ĉu tute seninflue tiuj du aparte laboris kaj kreis ?

Mi bone komprenas ke G. Waringhien miras ĉar li troviĝas ankaŭ en la antologio ; per poemeto kiu fakte ne estas poemo. Mi konas Waringhien kiel talentan poezi-tradukanton. Mi ŝatus ankaŭ legi originalaĵojn.

Mi ne forgesu noti tie-ĉi ke la libro enhavas 14 paĝojn da biografiaj notoj pri ĉiuj verkistoj.

Laŭ vasteco nia 70jara literaturo estas evidente ne komparebla al la naciaj literaturoj. Tiuj lastaj estas en la ebleco publikigi apartajn antologiojn de religia poezio, de infanpoezio, naturpoezio k.m.a. Ĉe ni tio ne estas la kazo. Efektive kelkaj inspirotemoj en vere valora poezio estas malofte troveblaj en Esperanto. Ĉu ekz. vi konas multajn belajn religiajn poemojn en nia lingvo ? Ankaŭ en tiu-ĉi antologio oni ne trovas.

Estas do despli bedaŭrinde ke ne aperis (verŝaine W.A. ne konis ĝin) la laŭ mi belega

" KRISTNASKO "

de nia bedaŭrata Juul Karnas :

Alvokas la sonorilet'
al preĝo.
Kovriĝas ĉio per tapet'
de neĝo.
Preĝejon iras tra malhel'
modesta karavano ;
ĉar dum ĉi-tiu nokto el ĉiel'
naskiĝos Kristinfano.
Kandeloj flagras sur l'altar'
dum preĝas nun Kristano ;
kaj supre el la anĝelar'
naskiĝas Kristinfano.
Nun ĝojas ĉiu sur la ter'
en domo kaj kabano.
Revenis paco kaj esper' :
naskiĝis Kristinfano.
Alvokas la sonorilet'
al preĝo.
Kovriĝas ĉio per tapet'
por Reĝo.

Ne kontraŭargumentu ke ĝi estas iom " simpla ". Mi volas memorigi ke ekzistas eble nenio pli simpla ol la muziko kaj la teksto de " Paca nokt' ; sankta nokt' ". Tamen ĝi konkeris la mondon kaj mi mem estas tuŝata plej profunde ĉiufoje kiam mi aŭdas ĝin. La sama validas por la poezio kun la " infano " kiel inspiro fonto. Certe devus havi lokon la ĉi sekvanta de Aini Setälä :

Infano, antaŭ viaj piedetoj
eĉ potenculoj kun humil' genuas.
Per viaj rozpetalaj manfingretoj
malbenojn, koran froston vi detruas.
Ĉe via lito ne ekzistas tia
malico, kiu ne fariĝas beno.
Sub via sunokul' forbrulas ĉia
amaro, skeptikemo kaj veneno.
La serĉa palp' de via mano varma,
ho kiom ĝia teno nin katenas !
Aŭtunas se vi alrigardas larma ;
printempajn birdojn via rid' entenas.

Jen kiu prikantas la infanon. Mi konas alian kiu priskribas infanan psikologion. Ĝi estas de S-ino Cath. J. Roskes-Dirksen :

INFANPREĜO

Patro nia en ĉielo,
paĉjo diris ĝin al mi
ke forprenis Vi patrinjon
ĉar Vi amas ŝin, ho Di'.
Mi ricevis novan pupon
kun lulil', laŭ mia peto ;
sed ne volas mi ludadi
sen la kara patrineto.
Bono via, granda Dio,
estas sen komenc', sen fin' ;
do, redonu al mi panjon
aŭ forprenu ankaŭ min.

Ankaŭ Marie Hankel vi ne trovos en ĉi-tiu libro. W. A. konscias kaj senkulpiĝas sin dirante ke aŭ la poemoj " ne restis freŝaspektaj " aŭ ke li ne konis ilin. Nu, ĉu li konis, kaj se jes, kion li opinias pri la sekvanta :

ESPERANTUJO

Mi ion deziras; mi havas demandon.
Mi serĉas ian tre belan landon :
lando kun por mi florantaj floroj;
kie varmege batas la koroj.
Ho lando belega, ĉu vi ekzistas ?
Sur nia tero kie vi troviĝas ?
Ho lando, ege deziregata,
kie vi estas, ho mia amata ?
Al via demando mi scias respondon.
Amikaj koroj plenigas la mondon.
Lando jam estas trovata :
« Esperantujo » ĝi estas nomata.

Laŭ mi, ankaŭ iom simpla ; sed tamen ĉarma, kaj freŝaspekto. Kaj ni ne ankoraŭ reliefigis tiun alian econ ke ĝi montras kiemanere la Esperantoidealo plenigas ies animon.

Resume mi diros ke tiu-ĉi antologio plene, plene kontentigas min. Eble vi miras pri tiu konkludo post la kritiko ? Tamen estas tiel. Estas ja ne-eviteble ke oni diras kelkloke : " mi opinias bedaŭrinda ke io . . . kaj bedaŭrinde ke ne tio . . . ". Se mi estus kolektinta antologion, tiam verŝajne mi publikigus libron kiu kontentigus nur min mem. La Esperanto-antologio estas bonega kaj belega kaj literatura monumento pri kiu ni fieru !

En la enkonduko, sur paĝo 25, W. A. diras : Mi esperas ke de nun oni rigardos samideanon, kiu

Via presejo estu
H. De Baene-Sercu
DELAPLACESTRAAT 3
SINT-KRUIS (BRUGGE)
pro la rapida kaj bonkvalita laboro

ne konas almenaŭ la ĉefajn poemojn en ĝi, kiel senhontan ne-edukiton aŭ analfabeton ". Tro severa juĝo ! ! Tute certe, la nekapablo ĝui poezion estas manko en la personeco kaj grava malhavo de fono de feliĉo en la vivo. Sed mi konas meritplenajn samideanojn, kiuj ne estas senhontaj ne-edukitoj, kaj kiuj tamen ne konas nian poezion, kaj ne plu legas poezion entute. La kaŭzo ? Ofte la tro ŝarĝita vivo kiu faras ke oni vole nevole devas komplete forlasi kelkajn terenojn kaj aktivojn. Kaj kiam oni depost jaroj estas forlasinta ilin, oni ne plu kapablas reenmoviĝi. Sed alian eldiron de la kompilinto, sur paĝo 26, mi faras tute la mian : "kursgvidantoj (kaj mi aldonas : programestroj de Esperanto-grupoj) uzu la antologion " ! Mi mem spertis. Kiam la kursanaro konsistas parte el studentoj kaj kleruloj, ili demandas : ne plu la banalaj frazoj por ilustri iun regulon, sed interesaj sentencoj kaj poemoj. Tiam la kurso (la kunveno) iĝas multe pli vigla kaj interesa.

Mi legis en iu kritiko ke nun devus ankoraŭ aperi antologio de originala prozo. Mi konfesas ke tia libro multe malpli allogas min. Citaĵoj el prozaj verkoj ne donas tuton, donas nur fragmentojn. Oni tamen povas ĝui kaj juĝi se la citaĵo estas mallonga rakonto, aŭ en la tuto iu kompleta priskribo de situacio aŭ de karaktero. Mi havas tamen deziron : antologio de tradukita poezio ! Multaj de niaj poetoj ankaŭ tradukis bonege, belege, majstre. Sed tiu-ĉi antologio estas " klasika " ! Kiel en la " klasikaj humanismaj studoj " oni lernas kun Greko kaj Latino samtempe la saĝon de la antikvuloj, tiel oni povas per tiuĉi antologio lerni kun Esperanto samtempe la aspirojn kaj la profundan internan vivon de gesamideanoj kiuj estis (estas) kaj naciaj kaj supernaciaj cerboj kaj animoj.

Drs. F. R.

HECTOR HOFMAN

SINT-JACOBSTRAAT 46, BRUGGE Tel. 326.21

Radio-aparatoj *ĉiuspecaj lumigiloj*
kaj elektraj aparatoj

10 o|o rabato por esperantistoj.

Korespondadadresoj :

ĉiuj el Germanujo :

instruisto Rüdeger Blobel — kun gekolegoj — Block Heimbach — Kreis Neuwied

lernantinoj : Gerlinde Engel — Neuwied, Werk Remy (14 j.)
Roswitha Janetzky, Block Heimbach — tra Neuwied — Siedlung 36 (13 j.)
Christjanna Stelter — Block Heimbach — tra Neuwied Siedlung 2 (13 j.)

Naturalismo kiel Doktrino Interlingvistika

de Peter Beiszwanger (de la universitato de Tübingen)

La nombro de L.I.-projektoj ne estas tiel granda kiel ni ofte timas. En vero, estis nur 6 signifaj projektoj ĝis nun : Volapük, Esperanto, Ido, Interlingue (Occidental) kaj Interlingua. La kaŭzo pro kiu ĝuste tiuj projektoj efikis, estas ke ĉiu el ili portis kun si iun tute novan ideologion. Volapük : plej granda perfekteco ; Esperanto : pleja simpleco ; Ido : maksimuma logikeco ; Occidental : plej granda naturaleco kaj Interlingua : naturaleco kiel sola standardo. En sciencaj rondoj la naturalismo akiras hodiaŭ pli kaj pli da komprenemo. Do, ni ne povas preteriri la devon okupi nin pri la tezoj kaj konceptoj de niaj naturalistaj duonfratoj.

La naturalismo ekzistiĝis tuj post la apero de Volapük (1879) kiel reago aŭ antitezo al ties artefariteco. Vi eble scias ke la akademio de Volapük, sub la gvido de Woldemar Rosenberger de Petersburg, transformis la projekton de Schleyer ĝis 1900 al tute alia, ekstreme " naturala " projekto, eĉ pli " naturala " ol Esperanto. (Forigo de la komplikita gramatiko, enkonduko de kelkaj sciencaj vortfar-metodoj per — tion, ktp.). Tiel ekestis Idiom Neutral kaj Reform-Neutral. Jam tiam kunlaboris Edgar de Wahl el Reval, unu de la ĉefaj reformantoj, unue Volapükisto, poste Esperantisto kaj ano de Rosenberger. Lia ideo : adapti la derivadon al la Latina derivado tiel ke oni akiras vortojn tute " naturalajn " :

formar, formation, reformation, reformator, informatori, formabil, conform, formate, deformar, informativ, formeceder, concession, precedent, recessiv, succeder, success, successiv, necesse, procession, venir, convenir, convenient, convenientie, convention, convent, ivention, provenientie, evenir, event, eveniment, advenir, advent.

Tia derivado ŝajnas senregula. Tamen de Wahl donis por ĝi regulon ne tro komplikitan laŭ kiu oni povas derivi

vider — vision, revisor, visibil
currer — curs, recursion, precursor, recursiv
exploder — explosion, explosiv
objecter — objection, objectiv
signar — signatura, signator, resignation
crear — creation, creator, creatura, recreation
expedir — expedition, expeditor
repetir — repetition, repetitor

Li devas simple preni kiel radikon vid-, curr-, explod-, signa-, crea-, expedi-, repeti- kaj starigi kiel regulon ke oni ricevas de tio la infinitivon per -er aŭ -r, la estantecon per forigo de la r, la pasintecon per almeto de -t (oni ricevas la t.n. " tema perfectic ") kaj ke la sufiksoj -ura, -ion, -or, -iv estas por la verboj en -ir kaj -ar metitaj simple al tiu " tema presentic " :

separar, noi separa, vu separat, vu ha separate (vi estas separata) illi es separate, separation, separativ.

Por la verboj en -er la regulo devas esti iom pli ampleksa.

prender, tu prende, partiprension, aprendr, aprension ; invader, invasi.

Nature, laŭ de Wahl, preskaŭ neniu bezonas lerni tiun regulon. La rilato vide-vision, peti-petition, crea-creation estas konata kiel Latinismo en ĉiuj lingvoj de la okcidento kaj ankaŭ el sciencaj terminoj kvazaŭ al la tuta mondo. Jen ekzemplo de la lingvo de de Wahl :

On admitte, que le complication es solmente aparent e que por un person familiari con modern scientific nomenclatura su aplication possede un facilità excessiv. Per le conservation del forme etimologic del radica noi aquire un instrument agreabil por è le scriptor è le lector.

Ni lasu de Wahl. Post 1900 unu el la plej eksterordinaraj sciencistoj, mia samfakano Giuseppe PEANO, profesoro de matematiko kaj logiko en Torino, faris tute aŭtonoman esploron de la problemo — Latino sine flexione. Tio estas nur projekto por scienco kaj estas la Latina sen konsidero de la latino gramatiko. Peano : Lingua se sina non habe grammatica. Lingua sine grammatica es de interpretatione immediato cum auxilio de solo vocabulario ". Nu, kara Peano, ĉu vi ne vidas kiom da gramatiko estas entenita en via lingvo ? Giuseppe Peano estus centjara en 1958 (li mortis en 1932) Lia revuo, alte fama, " Revue de la Métaphysique " ekde 1903 (tiam en sia kulmino) publikigis liajn gravajn esplorojn pri matematiko kaj logiko en Latino sine Flexione. Por la scienco ĝi taugis eĉ pli ol Esperanto ; por la vivo, ne. (Tian ambicion ĝi ne havis). La opinio de Peano pri Esperanto estis malfavora ĝuste pro sciencaj kaŭzoj kaj se mi vidas ekzemple la matematikan terminaron, mi komprenas ĝin. Ekz. en la tuta mondo oni diras unuece : quaternion, determinant(e), tangente ; kaj ni esperantistoj diru konfuzike kvaterniono, determinento, tanĝanto ! ? (ni neniam ridindiĝu !)

Jen pri la tempo antaŭ la unua mondmilito. Post ĝi, en 1922 Edgar de Wahl en sia revuo " Kosmoglott " publikigis sian projekton Occidental, poste nomita Interlingue. Novial, en 1928 publikigita de la granda Dana lingvisto Otto Jespersen estis sen ia signifo. En 1924 komenciĝis la aktiveco de IALA, fondita de la milionuloj-ambasadoroj gesinjoroj Morris (+ 1944 kaj 1952). Mrs. Morris estis esperantistino, sed ŝi celis tute objektivan esploron de la problemo. IALA sukcesis akiri la kunlaboron de specialistoj tutmondaj : Prof. Collinson kaj Stillman (Liverpool), Debrunner (Bern), Martinet (Paris/Columbia). Unue ŝajnis ke tiu International Auxiliary Language Association serĉis sintezon inter la ekzistantaj L.I., precipe esperanto. Sed post 1945 evidentiĝis ke oni decidiĝis por la naturalismo. La definitiva, multjara ellaboro de la lingvo de IALA okazis sub la gvido de Dr. Alexander Gode kaj rezultigis la projekton Interlingua. Jen specimeno :

Technicos norvegian ha disveloppate un submergibile apparato de illumination electric, que attrahe pisces verso le apertura del rete. On ha experimentate con le nove technica

in le Pacifico e reporta resultatos promittente.

Kiuj argumentoj subtenas la ideologion naturalismo ? Nu, laŭ la naturalistoj la lingvo ne bezonas esti preciza aŭ logika. Laŭ ili ne necesas ke unu verto korespondu al nur unu ideo kaj inverse. Estas ne grave ke kanono estas samtempe pafilego kaj eklezia normo. La naturalistoj argumentas ke ni ne rajtas diri " vizio " se vision estas kvazaŭ internacia. Laŭ ili, la multo de la komunaj morfemoj estas la elirpunkto. Tiu materialo devas esti esplorita. Kaj la labormaniero fari el ĝi internacian lingvon ne devas efiki ke tiu materialo estas ŝanĝita. Alivorte ili diras ke la internaciaj vortoj ne rajtas aŭtonome formi novajn vortojn, sed kiel eble plej servi sin per la internaciaj radikoj. En naturalisman projekton do povas eniri nur lingvo-elementoj kiuj tuj de antaŭe estas familiecaj je ĉiuj uzantoj. La aktiveco de naturalisto kiel konstruanto de L.I. do povas esti nur pasiva : li povas elekti nur inter jam ekzistantaĵoj ; mem konstrui aŭ kunmeti la trovitajn elementojn li ne povas. La naturalistoj diras ke ankaŭ ja la esperantistoj ne plu kreas per vortfarado novajn vortojn, sed tute simple uzas vortojn kiel " malsanulejo " " kongresanaro " kiujn ili lernis per legado aŭ parolado kiel tutajn vortojn.

Ili klarigas ke ĉiu esperantisto devis kun peno lerni la vorton " vortaro " apud " vorto " kaj ke do oni ŝparis nenion. Kontraŭe, se oni estus adoptinta " lexico ", ĉio estus pli facila. Kaj ili montras al ni liston :

vider vidi previder antaŭvidi

evident okulfrapa	provision procentaĵo
evidentie okulfrapeco	provisori duma
provider provizi	provisorium dumaĵo(?)
providentie providenco	improvisar improvizi
invidiar envii	improvisator improvizanto
invidie envio	improvisation improvizo
invidiose envia	revisor revizanto
vision vizio	revision revizo
visionari vizia	visa vizo
visibil videbla	vigiere viziero
visibilita videbleco	visitar viziti
invisibil nevidebla	visitator vizitanto
invisibilita nevidebleco	visitation vizito

Tiu listo, laŭ ili, estas por montri ke esperanto estas pli temporaba en la lernado. Mi lasas la kontraŭargumentojn al vi, kara leqanto. Ŝajnas al mi pli grave ke vi ankoraŭ kelkajn argumentojn de la naturalistoj ekkonu. Laŭ ili la internacieco estas ĉiuokaze la plej sekura kaj sola ebla gvidanto por kompili vortaron de L.I. Kaj ili asertas ke ekz. " reformation " estas ne malpli laŭregule formita ol " reformado " kaj ke la derivaĵoj en naturalisma sistemo estas egale facile analizeblaj kiel en Esperanto.

Mi juĝis necesa, senkomente submeti al vi la tezojn naturalismajn. Ĉiu esperantisto devas koni tiun doktrinon kaj havi respondon al ĝi. Permesu ke mi skribu nur unu gravan vidpunkton rilate al troa naturalismo : la vojo sekvita de Latino sine flexione kaj Interlingua, nome

rezigni pri ĉiu aŭtonoma vortfarado, kondukus al tio ke oni por ĉiu ideo devus serĉi unu plej internacian vorton sen konsidero de ebla derivado. Tio devas konduki al la kaoso, ĉar ne por ĉiu nocio oni trovos vere internacian radikon. Bone konstruita sistemo de derivado ĉiam estos necesa. La vortfarado estas en realeco la koro de Internacia lingvo.

Rimarko de la red. Kun danko ni publikigas tiun ĉi tre interesan studo-artikolon. Iuj eble opinios ke tiuj diskutadoj inter lingvistoj estas pura teoriumado, longe for de le reala vivo. Vere. Tamen, ni pripensu ke tio estas la vivagado de la plej granda parto de la pro profesio misformiĝintaj intelektuloj. Kaj ke tiuj intelektuloj ne malpli havas grandegan influon. Vole nevole ni estas devigataj sekvi ilin sur tiu vojo kaj ĝustigi ilian falsan argumentaron. Espereble tiu artikolo vekos eĥon. Respondecon pri enhavo havas la verkinto.

se vi parolas pri strovi... vi pensas pri viandaĵejo. se vi pensas pri viandaĵejo... vi aĉetas ĉe

STROVI

Vlamingstraat, 48 BRUGGE

STROVI - Varoj :
GARANTIO pri
bona kvalito
kaj bona prizorgado

Telefono : pogranda komerco 34559
detala » 33408

STROVI estas unuaranga !

Por festi la 100-jaran naskiĝdaton de Dro L. L. Zamenhof, ni okazigos la Unuan Kongreson de Indonezia Esperanto-asocio je la 1-a ĝis la 7-a de decembro 1959. Dum la kongreso ni aranĝos ekspozicion, tial ni petas alsendon de salutleteroj PK, gazetoj, prospektoj kaj alia materialo el ĉiuj landoj. Antaŭ-dankon ! Adreso : Indonezia Esperanto-asocio, Pintu Besi 39, DJAKARTA, Indonezio.

la kondiĉoj estas la plej profitaj
kaj la servoj la plej personaj ĉe

tio estas la sekreto
de gia rapidega progreso

Asocia sidejo : ROESELARE
Noordstraat, 38 Belgujo

Firma Van Iseghem & Verstraeten,
P.V.B.A.
st bernardse steenweg, 631 hoboken
vitraloj - speguloj - „ securit " vitro
kolorigitaj vitroj
aluminiaj senmastikaj stangoj por kupoloj
vitro-cemento por tutvitra-konstruaĵoj
mastiko
telefoon 37.88.20

manufakturaĵo firmo DE BROUWERE

Magdalenastraat, 29, Kortrijk (Belgujo) - Tel. (056) 216 54

VIRINAJ BLUZOJ KAJ JUPOJ
" MAGDELEINE "

deponita kvalitmarko

la perfekta konfekcio

fabrikita el plej bonaj svisaj teksaĵoj

Haveblaj en la bonaj konfekcibutikoj

PRECIPAJ CENTROJ:

Antwerpen	:	Aalmoezenierstr. 17
		Abdijstr. 57
		Anselmostr. 17
		Nationalestr. 87
Arlon	:	Marché-aux-Légumes 16
Brugge	:	Breidelstr 8
Brussel	:	Galerie d'Ixelles 9
		Bd. Anspach 194
Eupen	:	Kirchstr. 14
Gent	:	Brabantdam 25
Herstal	:	Rue Large Voie 4
Leuven	:	Bondgenotenlaan 49
Luxembourg	:	Place de la Gare 67
Roeselare	:	Ooststr. 124
Tournai	:	Rue Royale 75
Turnhout	:	Herentalsstr. 6
Verviers	:	Pont St. Laurent 2

DRUKK. H. DE BAENE-SERCU, DELAPLACESTRAAT, 3, SINT-KRUIS — TEL. 346.36